Jar-Raporto pri la 39A NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO DE ESPERANTO (NASK) 2008

La 39a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) okazis la duan fojon ĉe la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD). Inter 30 junio-18 julio, dek ok studentoj studis pere de la helpo de tri instruistoj: Birke Dockhorn (Germanio), Bertilo Wennergren (Svedio) kaj Lee Miller (Usono). La partoprenantoj venis de Kanado, Germanio, Nepalo, Svedio kaj Usono
(Kalifornio, Kolorado, Misurio, Norda Karolino,Novjorko, Vaŝingtonio), do la etoso estis interŝtata kaj internacia.

NASK 2008 ofertis tri kursnivelojn; postbazan, progresigan kaj altnivelan. Ĉiu kurso donis 5 stud-unuojn. Lee Miller, gvidis la postbazan, Birke Dockhorn la progresigan kaj Bertilo Wennergren la altnivelan. Hoss Firooznia faris du taskojn: aranĝon de la eksterklasaj aktivoj kaj redaktadon de la tagĵurnalo, *Naska Fasko.* En ĝin Hoss enmetis ne nur gravajn informojn pri la kursaro sed ankaŭ verkaĵojn de la studentoj mem. Oni povas trovi la retpaĝaron por la 2008a kursaro ĉe: http://bertilow.com/nask-2008-3/

Ĉiuj el la kursanoj ricevis ian ajn subvencion de la NASK-Studenta Fonduso de Esperanto-USA aŭ la Fonduso “Schulze Education Endowment” de la Esperantic Studies Foundation. La “Schulze Education Endowment” estas kreita pere de la heredaĵo de Bill kaj Cathy Schulze por certigi la daŭron de la someraj kursaroj. ESF ankaŭ subvenciis la kromajn kostojn ne kovritajn per la kurskotizoj.

Grant Goodall, profesoro ĉe UCSD direktas kaj ĉefrolas en la programo ĉe UCSD. Pro lia gvido, UCSD invitis nin starigi la kursaron tie denove en 2009. La datoj estas 29 junio ĝis 17 julio. Ni festos la 40an sinsekvan NASK dum tiu periodo per aldonaj aktivoj. NASK 2009 ofertos tri nivelojn de studado kun tri instruistoj: Spomenka Ŝtimec (Kroatio), Paul Gubbins (Britio) kaj Lee Miller (Usono). Detalaj informoj troviĝas ĉe http://esperanto.org/nask .

Ellen M. Eddy
Administranto NASK
La 31an de decembro 2008